Grekio bruliĝas

Ruĝ-Nigra Kunordigado

La greka junularo kriegas sian koleron kontraŭ polico, mortiganta 15-jaran knabon, kontraŭ politika klaso, gangrenita de klientisma kaj koruptema agado, kiu privatigas universitatojn, malriĉigas ĉiam pli la junularon kaj atakas la laboristajn atingaĵojn.

Ĉe Parizo, ĉe Madrido, ĉe Varsovio, ĉe Stokholmo, ĉe Romo kiel ĉe Ateno... la kapitalismo ekspluatas, maldungas, mortigas, krimŝajnigas la socian movadon kaj forpelas la senpaperulojn.

Solidarecon kun la grekaj studantoj kaj laboristoj! Internacian rezistadon! Ĝeneralan strikon kontraŭ la kapitalo kaj la subpremado de la ŝtato!

CNT (Francio),
LA (Polio),
CGT (Hispanio),
IP (Polio),
SO (Hispanio).

USI (Italio),
ESE (Grekio),
IWW (Anglio),
SAC (Svedio),

Ribelo en Ateno: Konstruante pli bonan estonton

Yannis Androulidakis

17a de novembro de la 1985

Post la manifestacio-homaĝo al la kontraŭdiktatoreca ribelo ĉe la Politekniko de Ateno je la 1973a, ekestas alfrontoj inter la polico kaj la anarkiistoj. Kontraŭtumulta policano pafas aeren kaj mortigas Mikhalis Kaltezas-n, 14-jaran anarkiiston. Dum la sekvaj tagoj la malordo regas la urbon. Ĝiaj ĉefaj universitatoj (Politekniko, Prikemia, ktp) estas okupaciitaj, surstrate okazas alfrontoj ĉiutage. Unuefoje la manifestacianoj iras surstraten kun duonmarkoj. Oni lanĉas fajro-botelojn kontraŭ bankoj, grandaj magazenoj kaj policveturiloj.

La konflikto daŭras semanon. La anarkiistoj estas surstrate, la ektrema maldekstro dekomence sekvas la movadon. Sed la plejmulto el la socio restas dome timigita. Por la plejmulto el la homoj temis pri ena disputo inter anarkiistoj kaj subpremantaj fortoj. Post kelkaj jaroj la malkondamno de la murdinta policano (li pafis je legitima defendo) okazigas duan serion de tumultoj. Same perfortaj, same senfruktaj rilate al la socio.

6 de decembro de la 2008a

Ĉe la historia kvartalo de Eksarĥio ano de la Speciala Gvardio pafas aeren kaj mortigas Alexandros Grigoropoulos-n, 15-jaran anarkiiston, kiu sidiĝis sur la trotuaro kun siaj amikoj. Nenia malordo antaŭis la murdon. Tiunokte mem la anarkiistoj sturmas la stratojn kaj la barikadoj stariĝas ĉirkaŭ la placo Eksarĥio. La tumultoj daŭras la tutan nokton kaj la sekvantan matenon. Sed ĉi-foje okazas io neatendita: laŭmezure kiel pasas la horoj kaj la okazaĵoj estas sciigataj pli kaj pli homoj iras surstraten. Je la sesa de la tagiĝo estas preskaŭ 10.000 personoj surstrate kriegante frapfrazojn, starigante barikadojn, lanĉante ŝtonojn sur la polico. Post unu tago “sovaĝa manifestacio”, laŭ taksado de la komunikmedioj, kunigas pli ol cent mil personojn ĉe Ateno kaj

aliaj lokoj, multajn centojn da miloj ĉe la tuta Grekio. Poste, dum la tria tago, senstrika lundo, plia dekoj da miloj iras surstraten al manifestacion daŭranta pli ol dek horojn. Kiam ĝi finiĝas, neniu banko kaj neniu plurnacia entrepreno restas sendamaĝe ĉe la centro de Ateno. Tiu ĉi situacio estis la rezulto de la kolera ago de homamaso, kiu ja distingiĝis ne per sia aĝo nek per sia politika sinteno. Mezlernejuloj kune kun sesdekjaraj homoj, laboristoj kaj studentoj, memsalajruloj kaj ne politikiĝintaj homoj, partoprenis la tumultojn plej grandiozajn, kiun neniam travivis Grekio, inkluzive de la tempoj de la intercivitana milito je la 1944a-1949a.

Kial ĉi-foje la socio kundandiĝis tiel rapide kun agmaniero, taksita kiel ne konstrua kaj eĉ kiel kontraŭsocia, kiun la aŭtonoma-anarkiista movado uzas ofte ĉe Grekio? Sendube oni ne ĉiam taŭgas klarigi tion, kion oni nomas "homamasa psikologio", amaso, kiu ŝajnas senmova kaj kiu ĉiam vekiĝas subite. Sed almenaŭ oni povas trovi kelkiun karakterizaĵon de la greka socio, kiu klarigos tiun vekiĝon.

Memvideble Grekio ne estas la nursola eŭropa lando, kie regas la novliberalismo (kaj kie ĝi ne lasis regi dum 25 jaroj). Sed tio, kio ja estas propraĵo el Grekio, estas, ke antaŭ multe da tempo la novliberalismo aliiĝis al nacia mito ligita al la modernigo de la lando, al la projekto de povoplena Grekio kaj sekve riĉa. Mito, influinte grave socion, kiu estas lacigita de la senĉesa malriĉo. Ĉe Grekio, kiel ĉe Hispanio aŭ ĉe Portugalio, oni neniam vivis la "eloran aĝon" de la eŭropa kapitalismo je la 60aj-70aj jaroj.



Tiu ĉi mito tuŝis okulfrape la esperojn kaj la sintenojn de la laboristoj. Ĉefe post la 1996a, dua socialista periodo, centoj da miloj da personoj ŝuldiĝis kun la bankoj por aĉeti domojn aŭ por ludi borson, kio iĝis nacia frenezaĵo dum 5 jaroj. Antaŭ ol tio, ke la krizo tuŝis la borsojn kaj la ekonomion de la tuta mondo, Grekio travivis je la 2001a partikularan kraŝon: kraŝon, kiu lasis la homojn multe pli malriĉajn, eĉ detruitajn kaj kun neelteneblaj ŝuldoj, samtempe la grandaj entreprenoj obligis siajn kapitalojn. Ĵus poste tiujn kapitalojn, kiuj devenis el neniu loko krom el la popolaj kaj laboristaj fondusoj, oni investis je la dekoligoj al la balkanaj landoj. Tiuj ĉi iĝis la "Eldorado" por la greka kapitalo, kiu iĝis povoplena loka imperialismo, akiranta la titolon pri "pli profitodona kapitalo" de la eŭroareo.

La ekonomia politiko pri "sobreco", kiun oni imponis kun la kroma pravigo de Ateno 2004a, donis la mortofrapon al la popola rento.

La nova malriĉo, rezulto el ĉiuj tiuj politikoj, malfermis la pordon al la novaj laboraj kondiĉoj: malstabileco, subleĝa

laboro, partaj dungoj; tio estas la almozo, kiun la mastraro ofertis al la novaj malriĉuloj. Ĉe Grekio jam ne estas nemalstabilaj dungkontraktoj por la junularo. La parlamentema maldekstro ofte parolas pri la “700-eŭra generacio”. Temas sendube pri troigo: malmultaj junuloj atingas hodiaŭ tiun ciferon kontraŭ 40-hora labora semajno.

Al tiu ĉi situacio nepras aldoni la plenan koruptadon de la politika klaso, kiu senĉese faras egajn donacojn al la mastraro aŭ al la ortodoksa eklezio –sendube la plej riĉa entrepreno el Grekio–, kiu ne alfrontis reale la brulegojn de la 2007a somero kaj kiu konstante baskulas ĉirkaŭ du politikaj partioj (socialista / dekstra), sed ankaŭ ĉirkaŭ du familioj (Papandréou / Karamanlis), kiuj dispartiĝis la povon dum 40 el la lastaj 50 jaroj.

Tiel do la tutmonda krizo notiĝis ĉe Grekio antaŭ ol tiam, kiam ĝiaj realaj sekvoj tuŝis la laboristojn. La popola nesekureco atingis sian pinton.

Estas plia kialo por tio, ke la popola respondo ĉe Grekio manifestiĝis tiel perforte: la malesto el strukturoj de socia kontraŭstaro. La sola sindikata centralo, GSEE, estas nur ŝtata institucio simila al tiu CNS de la frankistaj hispanaj tempoj: vertikala strukturo, tuta malesto de interprofesia solidaro, malesto de luktoj, kontrolo sur la sindikatoj de la politikaj partioj, koluzio kun la ŝtato (kiam la socialistoj regas, la prezidanto de la GSEE estas la Prilabora Ministro). Fakte la pri sindikata leĝo malpermesas la kreadon de aliaj sindikataj strukturoj, kio ne permesas la disvolvon de alternativoj.

Ĉiuj tiuj faktoroj produktis la ŝajnon de preskaŭ blinda socia kolero, de kolero, kiu ŝajnis detrui sen krei. Sed ne! Estis tra la cindroj el forbruligita urbo, kie aperis novaj popolaj strukturoj dum la tagoj de la ribelo. Ene de la okupaciitaj universitatoj estis starigitaj multaj laboristaj komitatoj, kiu funkcias preskaŭ kiel sindikatoj. La komitato de laboristoj kaj maldungitoj de la okupacio de la priekonomika fakultato ne ĉesis labori dum 19 tagoj (la okupacio finis la 25an de decembro) pri la desegno de nova programo el laboristaj postuloj, samtempe ili vizitis la laborejojn por disdoni propagandon, disvastigi la strikon kaj proponi kaj pretigi novajn organizajn strukturojn por la laboristoj. Ĉe multaj entreprenoj la komitatoj laboris por pretigi strikojn sen interveno de la oficiala sindikato. La okupacio de la sidejo de la GSEE je la 18a de decembro estis ago ĉefe simbola, sed ĝi pliintensigis la vidon pri la neceso de nova laborista organiza centro.

Dume tra la tuta Grekio stariĝis horizontalaj asembleoj cele sekurigi la demokratian organizon de la movado.

Tiu ĉi movado ne finiĝis. Malgraŭ la inerto de la plejmulta sindikato, malgraŭ la ĉiam pli agresema ŝtata subpremado, la rezistencaj strukturoj teniĝis dum la “festoj”. Je la unuaj tagoj de januaro rekomencas la batalon. Oni defendas ĝis la fino la ĝeneralan strikon por la 9a de januaro (ĝis nun pluraj sindikatoj deklaris sian intencon partopreni ĝin) kaj oni klopodos vidigi al la tuta socio la novajn popolajn strukturojn. Ĉar oni deziras, ke

estu la socio mem, kiu transformiĝu al tiu nova strukturo.

Grekio travivas iun el tiuj maloftaj historiondoj, kie la projekto revolucia, emancipiga, liberecana, anarkiista aliiĝas al spontanea sed organizita ago de la amasoj. Niaflanke ni alportas ĉiun forton el niaj koroj, niaj animoj kaj niaj korpoj por no lasi pasi tiun ondon sen detrui ĉiujn tiujn realojn, kiuj kondamnas nin al la mizero, la maldigneco kaj la sklaveco. Ni deziras, ke tiu ĉi akuŝo nasku la plej belan el la kreaĵoj: la liberon, la egalecon kaj la dignecon.

La tekstoj

- Coordinadora Roja y Negra: «Grecia está en llamas», *Rojo y Negro* 2008(220)6. http://www.rojoynegro.info
- ANDROULIDAKIS, Yannis: «Insurrección en Atenas: construyendo un futuro mejor», *Materiales Internacionales* 2009(11)1-2. http://www.cgt.org.es/spip.php?rubrique110

Esperantigis Jurgo Alkasaro

creative commons

Vi rajtas:

- **dividi** – kopii, distribui kaj transdoni la verkon
- **remiksi** -- adapti la verkon

Laŭ jenaj kondiĉoj:

- **Atribuo**. Vi devas atribui la verkon tiel kiel specifis la aŭtoro aŭ la permesil-posedanto (sed ne en maniero kiu implicas ke ili subtenas vin aŭ vian verkon).
- **Nekomerca**. Vi ne rajtas uzi tiun ĉi verkon por komercaj celoj.
- **Distribui kun sama permesilo**. Se vi ŝanĝas, adaptas, aŭ faras ion, kio baziĝas sur tiu ĉi verko, vi rajtas distribui la rezultan verkon nur kun permesilo identa aŭ simila al tiu ĉi.
- Por iu ajn reuzo aŭ distribuo, vi devas klarigi al aliaj la permesilon de tiu ĉi verko.
- Ajna el tiuj ĉi kondiĉoj povas esti nuligita se vi ekhavas permeson de la kopirajto-posedanto.
- Nenio en tiu ĉi permesilo endanĝerigu aŭ limigu la moralajn rajtojn de la aŭtoro.